



**Kunvenado · Klaĉado · Kongresado
Plaĉa post-pandemia printempiĝo**

STANISŁAW LEM estis pola verkisto de satira kaj filozofia sciencfikcio. Por festi lian centjaran datrevenon en 2021, Bjalistoka Esperanto-Societo eldonis tradukon de *Solaris*, lia plej fama verko. La eldonaĵo mem estas bela libro, kun 274 klare presitaj paĝoj, kudrite binditaj inter alloga malmola kovrilo.

Sciencfikciaj elementoj

Solaris estas romano pri kontakto inter la homaro kaj fremda intelektaĵo. La ĉefrolulo, psikologo Kris Kelvin, rakontas pri sia vizito al esplorstacio ŝvebanta super kvazaŭ-vivanta oceano sur la planedo Solaris, kiu orbitas sunparon en fora parto de la galaksio. Pri tia situacio, tute ne eblas eviti la priskribon sciencfikcio.

Kaj ja enestas temoj sciencfikciaj: kosma vojaĝo, inĝenierarto, ekster-tera estaĵo ... Kiel oni supozus pri libro verkita en 1961, ni renkontas teknologion el la Vostok-erao: Kelvin alvenas ĉe la stacio per raketo kun paraŝutoj; atendas la

varmiĝon de tuboj, ĝis la radio pretas; signalas per morsa kodo; aŭskultas magnetofonon kun bendo; legas mikrofilmon kaj – lede binditan – libron ... Tamen, troviĝas ankaŭ iloj el la tiama estonteco: mikro-reaktoro en la raketo; radio- kaj atom-paŝiloj; neŭtrina mikroskopo; artefarita gravito kaj fortokampoj.

En 1961 ne ekzistis la ĝenro-nomoj *atompunko* aŭ *ŝtalpunko*, sed la nekongrua kunmeto de teknologioj el diversaj epokoj ja iel donas tian impreson. Przemysław Wierzbowski, la tradukinto, tamen zorge etikedas la verkon ne «sciencfikcia romano», sed «romano kun sciencfikciaj elementoj», ĉar ĝi ja enhavas ankaŭ aliajn temojn. En la stacio, Kelvin traktas aron de enigmoj, sed tio ne estas kiel murdomistero, eĉ se tuj post sia alveno, li ja ekscias, ke ĵus okazis explorenda morto de antaŭa kolego. Ofte, solvo al unu demando nur malkaŝas plian misteron pli profundan – kaj ne al ĉiu enigmo troviĝas solvo, antaŭ ol la libro finiĝas.



Lem do uzas la romanon por esplori, kiel homoj, kaj la homaro, reagas dum kontakto kun la nekomprenata kaj la nekomprenebla. En tiu aspekto, ĝi estas pli filozofia, ol tradicia «malmola» sciencfikcio; kompare kun famaj filmoj ĝi pli similas al *2001*, ol al *Stelmilitoj*.

Senĉesa katalogado

La verko saltas inter du apartaj stiloj. Estas la aventuro aŭ intrigo, kiun Kelvin mem spertas, kune kun dialogoj kun la aliaj en la stacio; tiuj partoj estas sufiĉe viglaj kaj atentokaptaj. En malsama stilo, diversloke li detale raportas la esplorojn, hipotezojn kaj teoriojn – ofte nepruvitajn kaj nepruveblajn – pri la stranga oceano sur Solaris, faritajn de antaŭaj sciencistoj, dum preskaŭ jarcento



↑ Stanisław Lem, pola verkisto de satira kaj filozofiema sciencfikcio.

da enketoj. Jen plia temo en la verko: satiro pri la klerula pensmaniero en universitata fako aŭ burokrata scienca instituto. Nu, kiam la ĉefrolulo vortumas longe kaj detalege pri seka kaj senfekunda afero, estas danĝero, ke ties priskribo mem estos tia ...

Ekzemple, de tempo al tempo, sur la supraĵo de la kvazaŭ vivanta maro troveblas grandaj formoj kaj monstraj figuroj, kiuj ekaperas, evoluas, kaj, post kelkaj tagoj, disfalas ree en la maron. Iuj aspektas kiel urbo kun stratoj kaj muroj, iuj kiel skeleto de giganta senkarna besto, kaj aliaj kiel simetria aŭ abstrakta aranĝo, kvazaŭ profundaj matematikaj pensoj solidigitaj, kaj tiel plu ... En la libro, ĉiun specon kaj ĝian evoluon Kelvin priskribas detale, trans multajn paĝojn.



Luktante tra tiu ŝajne senĉesa katalogado, mi konfesas, ke mi trovis min trafoliumanta antaŭen senpacience, por nombri la restantajn paĝojn, antaŭ reveno al la intrigo kaj pli interesa enhavo. Ĝi pensigis min pri la sceno «tra la stelpordego» en la filmo *2001*, kiu celis doni al spektantoj mirigan alimondecan sperton, sed kiu daŭris tiom longe, ke kelkaj recenzantoj plendis pro teda enuo. Sed ree al *Solaris* – finfine, jes, ni ja atingas la finon de tiu priskribaro, kaj io interesa ja okazas!

Penso-lavango

En sia traduko, Przemysław Wierzbowski lerte uzas etoso-krean Esperanton. De tempo al tempo, tamen, li emas uzi vortumojn pli precizajn ol ĉiutagajn, eble ĉar li verkas en la «voĉo» de Kris Kelvin, sciencisto. Ekzemple, Kelvin prenas pilolojn ne el *botel(et)o* aŭ *skatolo*, sed el *bokalo*; tekston li legas ne en *libr(et)o* aŭ *broŝur(eg)o*, sed en *paskvilo*. La ĝenerala signifo kutime evidentas el la kunteksto, tamen mi ne priskribus la libron lego-materialo facila aŭ leĝera.

Plia observo mia pri la stilo estis, ke kelkfoje frazo aŭ eĉ alineo daŭras multe

pli longe, ol aŭ kutimas aŭ komfortas: precipe ĝenis min alineo, kiu transiris eĉ pli ol plenan paĝon, senpaŭze kaj senspirige. La kialon mi eksciis per prelego pri la traduko, spektebla en [Jutubo](https://www.youtube.com/watch?v=UWUWUWUWUW) ĉe [espinfo.org/solaris-prelego](https://www.esperanto.org/espinfo.org/solaris-prelego);

Wierzbowski klarigis, ke okaze

Lem intence evitis interpunkcion, por doni kvazaŭ «penso-lavangon», kaj tian teknikon intence imitis la tradukinto.

Ekster Esperantujo la romano *Solaris* tiel famas, ke aperis tri filmoj kun tiu titolo: du sovetiaj en 1968 kaj 1972, kaj unu usona en 2002. Ĉiuj estas adaptaĵoj, kiuj uzis nur kelkajn elementojn el la romano. Spektinte, do, version filman, oni ne spertis la tuton de la originalo. Se interesas vin sciencfikcio aŭ filozofie spekulativa fikcio – precipe tia, kiu, laŭ Boris Strugackij, «rekte aŭ nerekte influis la mondan sciencfikcion de la 20-a jarcento ĝenerale kaj precipe la rusan sciencfikcion» – tiun ĉi novan, bele vestitan eldonon ja indas legi. ■



↑ La tradukinto, Przemysław Wierzbowski.

↓ Afiŝo de la soveta kina versio de 1972.



Solaris, verkite de Stanisław Lem kaj tradukite de Przemysław Wierzbowski, estas disponebla ĉe EAB kontraŭ £10.